

La Riverego

Kebekia esperantista bulteno

Lasta papera Riverego

En viaj manoj troviĝas la lasta papera versio de la 24-jaraĝa bulteno *La Riverego*. Impresa, ĉu ne? Se ne, sciu ke *La Riverego* ne ankoraŭ elĉerpis siajn surprizojn...

Vous tenez entre vos mains la dernière version papier du bulletin La Riverego, qui a maintenant 24 ans. Impressionnant, non? Sinon, sachez que La Riverego vous réserve encore des surprises...

Paŝo al pli reta movado!

Normand Fleury

Mi pasigis tri monatojn esperantumante dum la somero 2009 kaj plurfoje aŭdis la samon: «La membraro de nia asocio falas, malpli da homoj pagas sian kotizon» kaj simile.

En Kebekio, la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) aktivas jam pli ol 25 jarojn kaj la membraro stagnas malgraŭ niaj klopodoj kaj agadoj. Kulmino de nia agado estis la okazigo en Montrealo de la 7-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE-7) somere 2008. Okazis larĝskala publika varbado. Ĉu multaj Kebekianoj subite membriĝis al ESK? Tute ne. Ĉu pluraj eklernis Esperanton post tio? Malfacilas respondi ĉar nun facilas lerni rete sen bezono kontakti nian asocion. Konstante membriĝas novaj personoj kaj certe pli ol mil homoj tion faris dum la lasta kvaronjarcento. Sed ĉiujare forfalas same multaj tiel ke sume malpli ol 100 personoj membras en ESK. Ni provis oferti studentan aŭ familian rabatitajn kotizojn. Laste, ni eĉ ofertis dujaran kotizon je pli favora prezo por provi konservi la membrojn pli longe kaj tiel farante malpezigi administradon. Nu, sensukce.

Ĉu ni decidis rezigni? Ne. Ni decidis funde modifi nian asocion al pli reta movado. Nova enirkotizo estos 25 kanadaj dolaroj. Post pago, iu estos membro tiom longe kiom li deziras. Jes, vi bone legis: tiom longe kiom li deziras. Ni invitos niajn membrojn donaci monon por subteni niajn agadojn sed ne plu necesos pagi jarkotizon. Nia papera bulteneto fariĝos reta ĉar ni rimakis, ke ĉiuj niaj membroj nun havas retadreson. Tiel farante ni draste malaltigos la koston al preskaŭ nenio kaj, krome, la bulteneto fariĝos pli bela, kolora, ofta kaj eĉ interaktiva. Fino de la kosto por presi, sendi kaj tiel plu.

Do, ekde nun, tiuj kiuj membriĝos ne plu forfalos post jaro sed nur kiam ilia retadreso malvalidiĝos sen sciigo al ni aŭ kiam ili kontaktos nin kun peto, ke ni malmembrigu ilin. Malpli da kosto, malpli da administrado, kreskanta membraro (ni esperas), pli da tempo por modernigi nian retejon kaj retan bultenon, jen la vojo, kiun la estraro de ESK decidis sekvi por la venonta kvaronjarcento!

Mouvement en r-évolution!

Normand Fleury

J'ai séjourné trois mois en Europe l'été dernier et profité pleinement de l'Espérantie (endroit où l'on parle l'espéranto). J'ai eu l'occasion de prendre part à cinq rencontres espérantistes dans cinq pays. Quel plaisir!

En discutant avec les responsables de diverses associations, j'ai entendu la même chose à plusieurs reprises: «Le membership diminue, les gens ne paient plus la cotisation et viennent moins aux rencontres, les gens ne sont plus membres, ils utilisent l'espéranto sur le web».

Au Québec, la Société québécoise d'espéranto (SQE) est active depuis plus de 25 ans et le membership stagne malgré nos efforts et nos actions publiques. Le point culminant de nos actions fut sans aucun doute la tenue du 7^e Congrès d'espéranto des Amériques (TAKE7) au cours de l'été 2008. Les médias ont largement couvert l'évènement. Est-ce que notre membership a fortement crû depuis? Pas vraiment. Est-ce que beaucoup de gens se sont mis à l'étude de l'espéranto? Peut-être, mais il est difficile de le savoir, puisque le web offre de nombreux cours sans que les gens aient à nous contacter.

Constamment de nouveaux membres s'ajoutent au noyau des anciens qui nous sont fidèles. Il y a sûrement près de mille personnes qui ont adhéré à la SQE au cours du dernier quart de siècle. Mais, bon an mal an, nombreux sont ceux qui ne renouvellent pas, de sorte que notre membership vacille sous la barre des 100 membres. Nous avons essayé d'offrir des cotisations réduites pour les étudiants, les retraités, les familles. Il y a quelques années, nous avons prolongé l'adhésion à deux ans tout en la réduisant. Rien n'y fait!

Avons-nous décidé de jeter la serviette? Pas du tout! Puisque nous savons qu'il y a de nombreux espérantophones et amis de l'espéranto qui nous soutiennent mais qui oublient de renouveler leur adhésion, le Conseil d'administration (C.A.) a décidé de vous faire une offre que vous ne pourrez pas refuser! La cotisation de 25\$ est maintenant une cotisation d'entrée. Après le paiement, nul besoin de renouveler votre adhésion. Vraiment, nous sommes sérieux. Aussi longtemps que vous le voulez, vous recevrez nos bulletins web.

Il est certain que nous vous solliciterons à l'occasion pour un don afin de mener à bien certains projets. Nous misons sur le web pour nous en sortir. C'est donc la fin de notre bulletin papier La Riverego. Nos publications seront électroniques dorénavant.

Moins de coût, moins d'administration, donc plus de temps pour moderniser notre site web, et nous réduirons du même coup notre empreinte sur l'environnement. Le C.A. est confiant d'avoir pris une bonne décision: l'avenir nous révélera la suite des choses. Merci de votre soutien!



Nova laborgrupo pri Esperanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj

Le travail de soutien à l'espéranto reprend à l'ONU

En la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj funkciis tre aktiva laborgrupo de UEA ĉe la ĉefsidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko. Inter la pintaj agantoj tiam estis Humphrey Tonkin. Nun sub lia gvido estas starigata nova laborgrupo, kiu jam faris siajn unuajn paŝojn. Humphrey Tonkin volas ne nur pli intense informi Unuiĝintajn Naciojn pri Esperanto, sed ankaŭ pliiigi la informadon al esperantistoj pri la laboro de Unuiĝintaj Nacioj.

Probal Dasgupto bonvenigas la iniciaton: "Por ke oni restu ano de la monda organizaĵara parlamento, oni devas laŭtaŭge ofte aŭdigi sin, sed ankaŭ aŭskulti la aliajn."

Universala Esperanto-Asocio havas formalajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj, kaj tial gravas, ke la membroj de la asocio estu informataj pri la funkciado de UN, opinias Humphrey Tonkin. Interalie li proponas, ke la revuo de UEA regule aperigu artikolojn pri la diversaj aspektoj de UN, kaj ke en ĉiu Universala Kongreso okazu seminario pri la laboro de UN.

La nun restarigata laborgrupo intencas ankaŭ malfermi retpaĝon, kiun konsentis starigi Pierre Jelenc el Novjorko. En la retejo laŭplane aperos informoj pri la agado de UEA ne nur ĉe la ĉefsidejo de UN en Novjorko, sed ankaŭ pri la agado rilate al UN kaj Unesko en aliaj lokoj.

- En la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj estis tre aktiva laborgrupo ĉe UN, kiun mi aparte diligente prizorgis, kaj kies sekvo estis serio da ĉiujaraj konferencoj, kiujn ni organizis kunlabore kun la lingvaj servoj de UN. La grupo fariĝis malpli aktiva en la 1990-aj jaroj kaj poste, kvankam Rochelle Grossman, emerita oficisto de UN, tenis la aferon funkcia, kaj ankaŭ mi de tempo al tempo povis vojaĝi al Novjorko por prizorgi UN-aferojn. Sed Rochelle malsaniĝis. Antaŭ unu jaro, Neil Blonstein, emerita instruisto, transprenis la laboron, kaj Neil kaj mi komencis revivigi la agadon, lastatempe kun helpo de Thomas Eccardt, Scott Page kaj Ulrich Becker,

rakontas Humphrey Tonkin.

Fine de la 1970-aj jaroj ĉe la ĉefsidejo de UN en Novjorko aktivis ankaŭ Probal Dasgupta, la nuna prezidanto de UEA. Tuj post la Rejkjavika kongreso en 1977, li tri semajnojn volontulis en la Centra Oficejo de UEA. Li poste reprezentis Universalan Esperanto-Asociacion ĉe Unuiĝintaj Nacioj inter oktobro 1977 kaj januaro 1979. Post tio oni kreis la Novjorkan Oficejon de UEA por daŭrigi lian laboron.

Probal Dasgupta memoras, ke al la laboro tiam grave utilis la helpo de la estro de la aŭstralia delegacio ĉe UN, la konata esperantisto kaj diplomato Ralph Harry.

- Tio ĉi komenciĝas post la UK en Rejkjaviko (mia unua UK), kiun alparolis la ĝenerala direktoro de Unesko, Amadou-Mahtar M'Bow. Mian unuan vesperon en la UK mi pasigis kuntradukante kun Brian Moon (kies tradukulan eminentecon mi tiam ne sciis) la M'Bow-dokumenton kaj tuj tajpante ĝin sur stencilon, kaj la nokton ni pasigis multobligante kaj krampante la sekva- matene bezonotajn 1200 ekzemplerojn.

Tiam 24-jara, li volis vidi tujajn rezultojn, kaj sentis skeptikon pri la valoro de la laboro ĉe UN kaj Unesko, Probal Dasgupta memoras.

- En la flughaveno, post la kongreso, mi iom laŭte esprimis tiujn sentojn al Sadler. Sadler diris, "Se vi volas efiki sur la politikon de UEA rilate al UN, vi povas simple partopreni la laboron kaj efektiviĝi viajn evidentajn aliajn ideojn". Li turnis sin al Humphrey kaj diris, "Ĉu ni varbu Probal kiel reprezentanton de UEA ĉe la UN-sekretariato en Nov-jorko?" Humphrey, evidente citante la titolon de la siatempa organo de -Junularo Esperantista Brita- (el la epoko, kiam li kaj Victor kaj Duncan kaj John estis kune en la britaj studentaj rondoj), diris "Kial ne?", kaj oni ekulis la procezon devigi min traduki mian kritikemon en agemon.

Mekaro 2010 baldaŭ!

Vi baldaŭ havos la okazon vidi samideanojn el Nord-orienta Ameriko dum la Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto. Vizitu la retejon de ESK por pliaj informoj!



Esperanto-Societo Kebekia
Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro: marte, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo: keb-k-d.

Redaktado, Grafismo, muntado kaj eldono: Francis Gauthier (riverego@esperanto.qc.ca). Estraranoj de ESK: Normand Fleury (prezidanto), Suzanne Roy (vicprezidanto), Sylvain Auclair (sekretario), Pierre Pouliot-Lavoie (kasisto), Martin Benoît (konsilanto).

La Riverego (*Le Fleuve*) est publikita per la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction, Graphisme, montage et édition : Francis Gauthier (riverego@esperanto.qc.ca). Administrateurs de la SQE: Normand Fleury (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire), Pierre Pouliot-Lavoie (trésorier), Martin Benoît (conseiller).

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8
informo@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

En tiu epoko UEA laŭ Probal Dasgupta volis varbi la apogon de ŝlosilaj naciaj delegacioj ĉe UN, proponi al la eduka centro de UN (Unitar) konkretajn eksperimentojn pri la uzo de Esperanto en specifaj sektoroj, popularigi la uzon de Esperanto por pli justa transdono de teknikaj scioj al evoluantaj landoj, kaj pli ĝenerale agadi por pli justa monda komunika ordo, laŭ la tiama strebado de Unesko.

- Lige kun la unua celo, mi vizitis kun Humphrey almenaŭ la rusan, ĉinan, baratan delegaciojn kaj funkciulon en la oficejo pri publika informado. La vizitoj ne estis varbaj sukcesoj, sed almenaŭ havis la efikon evidentigadi nian plueston sur la mapo.

Kvankam ne multaj el la starigitaj celoj estis atingitaj, la intensa laboro ĉe UN ne estis senutila, opinias Probal Dasgupta:

- La stimulo de laborado por provi kapti la atenton en UN igas nin pli celtrafe mobilizi niajn proprajn scierojn. Mi dirus, ke la novjorka unuo de la UEA-volontulaj laboroj, kiun oni tuj post mia foriro transformis en UN-oficejon, estis unu el la kovejoj de la posthamburga ideologia linio de UEA - organizaĵo volanta forĝi al si apartan identecon kiel avangarda sed internacie respondecata kultura agantaro, kiu aparte interesiĝas pri la bezonoj de la plej malbone servataj partoj de la homaro, kiu kunlaboras kun simildeziraj agantaroj, kaj kiu sin mem kuntenas per la uzo de facila, celtrafe arkitektita lingvo de amikeco.

Laŭ Probal Dasgupta, post la misiisma epoko de la 1960-aj jaroj UEA movis sian strategion en la direkto de konversacioj kun di-

versaj agantoj por pli justa mondo, enfokusigante la demandojn de la homaj rajtoj.

- En la 80-aj kaj 90-aj jaroj UEA partoprenis konversaciojn pri la ekologio, reliefigante la lingvan aspekton de la ekologio kaj prezentante Esperanton kiel partoprenejon en specifaj niĉoj de la lingvaj ekologioj en sufiĉe diversaj ekosistemoj de la planedo. En tiu tempo, UEA varbis la gravan paron Skutnabb-Kangas kaj Phillipson, kaj disvolvis propran strategion en la Praga manifesto. De tiam UEA flegas plurisman bildon de lingvaj rajtoj.

La restarigo de la laborgrupo de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj estas taŭga paŝo en la "aktiva kaj pacienca" strategio kiun UEA entreprenu, opinias Probal Dasgupta. Laŭ li, UEA devas ofte aŭdigi sin, sed ankaŭ aŭskulti la aliajn, kaj interveni en la konversacioj kiam la temoj maturiĝas.

- Ĉi-rilate gravas substreki la gvidan rolon de Lee Chong-yeong. Kaj lia Kampanjo 2000 kaj lia festado en 1998 en la UN-oficejo en Genevo de la 50-jariĝo de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj estis konstruitaj ĉe la intervizaĝo inter UEA kaj la UN-sistemo, kaj ambaŭ liaj fortostreĉoj efikis mobilize en la Asocio mem. Lia iniciato en 1998 estis ekzemplo de trafa interveno. Ankaŭ nia renovigo de tiu iniciato en Genevo en 2008 estis io spronita de li, postkulise; la kunmetadon de nia simpozio en Genevo en 2008 gvidis ege inspire Ranieri Clerici; jen alia ekzemplo de trafa interveno en trafa momento.

Fonto de ĉi tiu artikolo : Liberafolio

La Riverego iĝas anĝelo

Le rédacteur-fondateur de La Riverego rappelle son histoire.

Sylvain Auclair

Nu, en tiu tempo kiam *La Riverego* lasas sian paperan korpon por iĝi interreta anĝelo (el greka vorto signifanta mesaĝisto), mi, la unua redaktisto de nia bulteno kaj tiu, kiu plej longe redaktis ĝin, emas rememori ĝian ĝisnunan vivon.

La Esperanto-Societo Kebekia lanĉis sian bultenon en Januaro 1986, antaŭ 24 jaroj, kelkajn jarojn post la fondo de la Societo. La estraro tiam hezitis inter du nomoj: *La Riverego*, mia propono, aludante la riveregon Sankta-Laŭrenco, pli malpli la spino ĉe kiu organiziĝas la Kebekia teritorio, kaj *Verdire*, (komprenebla verd-ire aŭ ver-dire), proponita de Normando. Komence — junuloj eble ne kredos min — mi uzis neniun komputilon por pretigi ĝin. Mi devis tajpi la artikolojn en la ĝusta larĝeco per tajpilo, tamen elektra kaj ebligante plurajn tipojn, kaj la paĝaranĝado konsistis el paperpecoj gluitaj en la deziraraj lokoj. La titoloj estis kreitaj el literfolioj el kiu oni per frotado gluis la literojn sur la paperon: ne eblis korekti eraron. La unua paĝo estas aŭ desegno aŭ bildo... pruntita... el alia Esperantista revuo.

La Riverego prezentis ĉefe la agadojn de la Societo kaj raportis pri la aktivecoj, ofte el la vidpunkto de komencantoj. Sed ĝi ankaŭ entenis artikolojn pri la tutmonda E-movado, primovadajn diskutojn en Kebekia aŭ tutmonda niveloj, diskutojn pri lingvaj

punktoj. Ĝi eĉ publikigis poemojn kaj kanzonojn, ofte tradukojn de Kebekiaj kanzonoj.

Komence en duona formato kaj poste sendita sen kovertoj, foje kun kolora ekstera paĝo (ŝanĝiganta laŭ la sezonoj), dum kelkaj jaroj uzanta brunan reciklan paperon, por kelkaj numeroj atinganta 150 ekzemplerojn, longe nur en Esperanto (dum tiu tempo, estis eldonata alia revuo, franclingva, celanta la tiel nomatajn Amikojn de Esperanto, alia membrokategorio) poste en du lingvoj, baldaŭ uzanta komputilon por la tajpado (post endoma kreo de ĉapelitaj literoj...), *La Riverego* plej regule eldoniĝis po kvar fojon en jaro (krom dum unu jaro, kiam ni eldonis kvin numerojn kaj alprenis nian ĝisnunan ritmon, kun eldonoj en Marto, Junio, Septembro kaj Decembro).

Kvankam modesta, ofte kun artikoloj kopiitaj de aliaj bultenoj, kiuj rolis kiel niaj eksterlandaj kontribuantoj, nia bulteno almenaŭ estis regula, kio estas raraĵo en la mondo de bultenon eldonitaj de etaj asocioj kaj redaktitaj de ne pagitaj volontuloj.

En la unuaj numeroj, mi verkis prezentan artikolon, kiu aperis en paĝo dua (la unua paĝo konsistis el bildo). Mi ĉiam komencis la artikolon per Nu, kaj finis ĝin tiel, kiel mi finos tiun ĉi: Salutas, Silvano



Esperantistoj festas la 15-an de Decembro Zamenhofa tago - tago de E-libroj

15 décembre : La fête de l'espéranto et des livres en espéranto

Zdravka Metz

UK 2009 okazis en Bjalistoko por festi ĉi-jare la 150-jariĝon de la naskiĝo de L.L. Zamenhof. Por tiu kongreso, la eldonejo Mondial el Novjorko realigis la duan, pli ampleksan kaj kvalitan eldonon de la libro Vivprotokoloj.

La libro estas kolekto de 31 rakontoj pri 31 simplaj homoj, kiuj havas diversajn: aĝojn, profesiojn, naciojn, kulturojn; kiuj havas sian familion aŭ vivas sole. Foje ili konas unu la alian, foje temas pri izolitaj Esperantistoj; tute novaj komencantoj aŭ eble elstaraj, konataj movadanoj. Tio kio unuigas ĉiujn estas Esperanto. Ili ĉiuj lernis la lingvon, ĉu studante grupe, aŭ solaj per koresponda metodo, instrulibro aŭ per komputilo.

Vivprotokolojn redaktis, post interparolado aŭ korespondado, Ulrich Becker kaj Zdravka Metz. La ideo pri tia libro venis de Monda Kunagado, movado por Edukado, Scienco kaj Kulturo.

Legante pri la vivo de Esperantistoj, oni lernas pri kutimoj en iu lando, pri ĝia kulturo, historio, tradicioj, rilatoj familiaj kaj amikaj, pri loĝado kaj translokiĝado — la ĉiama migrado de homoj pro plej diversaj kialoj...

Vivprotokoloj havas 214 paĝojn kaj aĉetebblas ĉe la Libroservo de la Kanada Esperanto-Asocio.

La prezo de 15 dolaroj estas bela donaco por vi aŭ via amiko(ino) por ĉi-jara tago de libroj.

Unuafojo en ARE

Premier ARE raconté par l'auteure

Suzanne Roy

Ĉi-oktobre okazis la 16a ARE, Aŭtuna Esperantista semanjfino, kiu ĉiujare kunigas Esperantistojn el nordorienta Ameriko. Por mi, estis malkovro de belega regiono kaj multaj novaj spertoj. Mi rakontu.

Silvero, la renkontiĝejo, troviĝas en ŝtato Novjorko, ĉe lago Georgo, pli-malpli 5-hora veturado el Tririvero. Ni dicitis eliri vendredon, por ĝui pli longe la okazon. Do tiuvespere ni malstreĉiĝis surloke kaj ekkonis interesajn homojn, interalie la faman Bierfariston, kiu eldonas humorplenan Esperantan revuon en Usono, kaj ankaŭ Nilj el urbo Novjorko, kiu faris longan Esperantan vojaĝon cismere.

ne!» Post unu horo, ni tute ne sciis, kie ni staris. Sed perdiĝo estas plezuro por sentimaj esplorantoj kiel ni! Post laciga sed agrablega promeno tra aŭtuna arbaro, ni retrovis la hotelon ĝustatempe por oficiala malfermiĝo de ARE.

Ĉeestis ĉirkaŭ 50 diversaĝaj kaj diversdevenaj Esperantistoj, bela kunvenantaro, kies multajn trezorojn ni nur parte malkovros dum semajnfino... Ĉiu travivas tian renkontiĝon siamaniere. Spertaj partoprenantoj ĝuas revidi malnovajn amikojn. Novuloj ekkonas Esperantan kulturon.

Mi travivis serion da «unuj fojoj»: unua antaŭpublika parolado en Esperanto, unua publika muzikludado kun mia amiko Karlo, unua briĝludado en Esperanto, unua nokta fajro kaj kantado en Esperanto, unua stelobservado en Esperanto... Kia memorinda spertaro! Ne eblas ĉion rakonti sed mi esperas, venontan aŭtunon, vidi VIN ĉe la majesta lago. Kune (kaj Esperante!) ni kantos:



Kultura vespero en ARE

Fajro varmega, via varmeco nin ĝojigas

Fajro varmega, varmigu la nokton.

Ni ŝategas varmecon, ni ŝategas fajron !

Fajro belega, via beleco... beligu la nokton

Fajro ruĝega, via ruĝeco... ruĝigu la nokton

Elpensu aliajn !

Ĝis !



Parto de la mirinda pejzaĝo kiu gastigas ARE

Sabaton matene, la suno invitis nin malkovri la belegan kaj grandegan bienon, kiu apartenas al YMCA kaj vidis, antaŭ 100 jaroj, naskiĝon de usona skolta movado. Ĉar ni marŝis ekster la hotelo legante mapon, sinjorino ĉuis: «Perditaj?» Mi replikis: «Ankoraŭ



Ses esperantistoj en la ĝenerala konferenco de UNESKO

La 6-an de oktobro okazis en Parizo la inaŭguro de la 35-a Ĝenerala Konferenco de Unesko, kiu daŭros ĝis la 23-a de oktobro. Tiu ĉi supera organo de la organizaĵo kunvenas ĉiun duan jaron kunigante reprezentantojn de la 193 membroj-ŝtatoj por difini la politikon kaj agadprogramojn de Unesko. La plej interesa decido de la nuna konferenco sendube estos la elekto de nova ĝenerala direktoro por anstataŭi la japanan diplomaton Koichiro Matsuura, kiu okupas la postenon ekde 1999. Antaŭvideble Unesko estos unuafoje gvidata de virino, ĉar kiel la solan kandidaton ĝia plenumkomitato proponas ambasadon Irina Bokova el Bulgario. La formala elekto okazos la 15-an de oktobro.

Ses personoj reprezentas la mondan esperantistaron en la konferenco. Pro siaj oficialaj rilatoj kun Unesko, Universala Esperanto-Asocio estas aŭtomate rajtigita partopreni la Ĝeneralan Konferencon kiel observanto. Nomo de UEA ĉeestas Renée Triolle, Barbara Despiney kaj Estelle Loiseau. Unesko invitis ankaŭ Internacian Ligon de Esperantistaj Instruistoj, kun kiu ĝi daŭrigas rilatojn sur neformala bazo. Kiel siajn reprezentantojn ILEI delegis Monique Arnaud, Jean-Pierre Boulet kaj François Lo Jacomo.

La filma oferto de UEA plivastiĝis

La 6-an de oktobro aperis la 5-a numero de la filmjurnalo UEA viva kun tri eroj. Unue Emilio Cid raportas pri la rezultoj de la informkampanjo ĉirkaŭ la 94-a UK en Bjalistoko, al kiu li alvokis laŭ komisio de la Estraro de UEA en la filmjurnalo en majo. Cid estas sufiĉe kontenta pri la rezultoj kaj instigas plu daŭrigi la agadon ankaŭ nun, kiam la UK jam apartenas al pasinteco. En la dua ero, pruntita el la televida servo de UN, oni vidas elpaŝon pri lingvaj rajtoj fare de la UEA-representanto Mireille Grosjean ĉe la Homrajta Konsilio de UN fine de septembro. La fina parto estas dediĉita al TEJO. Oni vidas sinprezenton de la nova Estraro de la junulara sekcio de UEA en la jusa ARKONES en Poznano, Pollando.

La reta kinejo de UEA ĉe Ipernity pliriĉiĝis per valoraj historiaj dokumentoj. La filmo "Lingvo festis naskiĝtagon" de Michael Cwik raportas pri la impona UK de la Jubilea Jaro 1987 en Varsovio. Scenojn el la Budapeŝta UK en 1966, i.a. kun fragmento el la festparolado de Ivo Lapenna, montras la filmo "Esperanto-fonto", kiu unuavice rakontas pri la eventoplena historio de nekutima ZEO apud la hungara ĉefurbo. La plej lasta el la novaĵoj en la reta kinejo estas samtempe la plej malnova el ili, nome dokumenta filmo pri la 48-a UK en Sofio en 1963. Ĉiuj ĉi trezoraĵoj devenas el la Biblioteko Hodler, kies filmojn UEA iom post iom ciferecigas por pli facile disponebligi ilin al la movada publiko.

La adreso de la reta filmjurnalo en YouTube estas: <http://www.youtube.com/user/UEAviva> kaj tiu de la reta kinejo en Ipernity <http://www.ipernity.com/home/97850>.

el UEA

Communiqués de l'Association universelle d'espéranto

Nova elpaŝo de UEA ĉe UN pri lingvaj rajtoj

Universala Esperanto-Asocio elpaŝis denove en kunsido de la Homrajta Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo. Jen la teksto de la originale franclingva interveno de la UEA-representanto Mireille Grosjean:

"Sinjoro Prezidanto, Gesinjoroj,

Mi reprezentas Universalan Esperanto-Asociacion, la asociacion de la internacia lingvo neŭtrala kaj demokrata, uzata en pli ol 100 landoj. Esperanto ebligas egalrajtajn kontaktojn inter kulturoj kaj protektas la lingvojn de minoritataj popoloj. Pro tio, kaj konforme al art. 19 de la Deklaro kaj Agadprogramo de Vieno, kiu antaŭvidas la instruadon por ĉiuj en la loka lingvo, ni defendas la lingvajn rajtojn kaj deziras konigi al vi jenajn faktojn: En la ŝtato Mizoramo, Barato, la minoritata etnogrupo de ĉakmaoj suferas lingvan diskriminacion. La infanoj devas lerni per la mizoa lingvo, aŭ per la angla, kiujn ili lernis neniam antaŭe. Ili neniam povos kandidatiĝi por registaraj postenoj, ĉe kiuj la scipovo de la mizoa lingvo estas deviga. Tamen, en art. 16 de la Barata konstitucio staras: 'Devas esti ŝanca egaleco de kandidatoj por registaraj postenoj'. Ni rekomendas enkonduki por la infanoj de tiu lingva minoritato la plurlingvan edukadon (inkluzive la lingvojn ĉakmaan kaj mizooan) surbaze de ĉefa uzo de la gepatra lingvo. En Slovakio, nova leĝo estas promulgita, kiu antaŭvidas monpupon pro uzo de fremda lingvo. Ni komprenas la intencon de la leĝdonanto, kiu volas protekti kontraŭ tre forta enstrudiĝo de la angla en la ĉiutaga uzado de la nacia lingvo. Tia leĝo, kiu estas laŭdinda rilate al protektado de la nacia lingvo slovaka, povus esti misinterpretata rilate al la malplimultaj lingvoj. Ni gratulas la registaron de Malajzio, kiu re-enkondukis la instruadon de sciencaj studobjektoj en la malaja lingvo, anstataŭ en la angla, same kiel la registaron de Bolivio, kie la lingvoj ajmara, keĉua kaj gvarania kune kun la tradiciaj konoj estas instruataj en universitatoj. Mi dankas vin pro via atento."

La alparolo de UEA estas videbla en n-ro 5 de la reta ĵurnalo UEA viva, www.youtube.com/watch. Pli da filmaj raportoj kaj intervjuoj pri la aktivado de UEA ĉe UN en Ĝenevo estas videblaj en www.youtube.com/EsperantoTv.



De 18 ĝis 1800!

Une épopée à travers l'Europe

Normand Fleury

Dum tri monatoj, mi esperantumis tra Eŭropo. Nu, mi scias, ke mi nek estas la unua Esperantisto, kiu faris tion, nek estos la lasta. Estas eĉ libroj pri Esperantistoj, kiuj vojaĝis dum jaroj pere de Esperanto. Mi kanguruis* al kvin aranĝoj dum mia vojaĝo kaj ŝatus raportoj pri mia sperto. Mi unue ĉeestis KEFon (Kultura Esperanto-Festivalo) en Danio. Tio estis mia unua KEF kaj mi vere ŝatis ĝin. Dum semajno, povi ĉeesti dekojn da koncertoj plej divers-stilaj estis interesa sperto por mi. Krome, mi aparte ĝuis la programeron pri sinprezentado de la artistoj. KEF estas interesa ĉar ĝi ebligas



Ekotur-anoj piede kaj bicikle vizitis Ĉeĥion dum semajno

konatiĝon kun la artistoj antaŭ kaj post koncertoj. Okazis ankaŭ atelieroj pri verkado, teatraĵoj kaj dancado.

Post ĝi, mi ĉeestis SESon (Semajno por Esperanto-Studado), organizitan de e@i. Alvenis iom malpli ol 100 personoj el 22-o da landoj. Ĝi okazis en Modra-Harmonia, fakte meze de la naturo en Slovakio. Taŭga loko por tia aranĝo kun kursoj matene kaj plej diversaj aktivecoj posttagmeze. Ankaŭ la vesperoj estis interesaj kun koncertoj, filmo-prezentado kaj tiel plu. Mi agis kiel anĝelo, tio signifas, ke mi helpis la komencantojn, respondante demandojn kaj simile. SES celas kunigi la retajn lernantojn de la retejo www.lernu.net tiel ke ili spertu vivantan Esperanton, ne

*Kangurui : Iri de unu Esperanto-aranĝo al alia sinsekve. Kanguruo: Esperantisto kiu partoprenas plurajn Esperanto-aranĝojn. Vorto kreita dum la IJK en Liberec.

nur virtualan. La gelearnantoj vere deligente lernis matene en kvar diversnivelaĵoj kursoj. Kvardeko da ili poste plu veturis al la IJK (Internacia Junulara Kongreso) en Liberec, norda Ĉeĥio. Ĉu necesas prezenti IJKon? Mi diru, ke la kongresejo estis vere taŭga, bonegaj tranoktaj kondiĉoj kaj lokoj por kunsidi. Bone, tiuj kiuj dormis en ĉambroj tuj apud la nokta diskejo ne povis silente dormi, sed tio ja estas IJK. Mi ankaŭ aldonu, ke la programo estis tre varia kiel kutime kaj ke la lingva kultura festivalo ĉe la centra placo de Liberec estis vere sukcesa. Tiu nun tradicia aranĝo dum



300 gejunuloj ĉeestis la IJK 2009

IJK, lerte prezentas la internaciecon de nia movado. Mia ĉefa riproĉo estas pri la manĝoj. Mi aŭdis de nevegetaranoj ke viando po tri fojojn en tago estas ja tro, dum vegetaranoj ofte tute ne ricevis proteinojn. Blankaj nudeloj, blanka rizo aŭ terpomoj kun legomoj ne estas ekvilibritaj manĝoj.

Post la IJK mi iris al UK (Universala Kongreso) en Pollando. Mi ne devas longe prezenti ĝin ĉar jam aliaj faris tion. Mi simple aldonu, ke la Poloj tre lerte organizis ĉion kaj la urbestro multon faris favore al la kongreso. Mi vere ŝatis la E-muzeon, la kulturajn programojn vere profesiajn kaj la grandan koncerton ĉe urboplaco. Fine, la kvina aranĝo estis Eko-Tur (Ekologia turismo) en Svitavy, Ĉeĥio. Malgraŭ la malgranda nombro da partoprenantoj (18), mi ŝatis mian semajnon. Ĉiutage estis piedaj aŭ biciklaj ekskursoj al apudaj vidindaĵoj. Vespere okazis prelegoj pri ekoturismo, la verduloj, fia senarbarigo tutmonda, manĝeblaj floroj kaj tiel plu. Fine de la semajno, mi bone konis ne nur la regionon de Svitavy sed ankaŭ la partoprenintojn, kaj tio agrablas.

Mia vojaĝo ne limigis sin al Esperanto-aranĝoj. Mi krome uzis la Pasportan Servon de TEJO en kvin landoj. La magia etoso de Esperantio regis kaj vere beligis mian malkovron de orienta Eŭropo. Mi forte rekomendas al vi esplori la buntecon de la Esperanto-aranĝoj kaj ne heziti partopreni malgrandajn eventojn. Al mi, la malgrandaj estis same plaĉas kiel la pli grandaj.

Ŝtatestroj timas subteni Esperanton parte pro tio ke ili timas aspekti ridindaj, nu...



Les chefs d'États craignent de soutenir l'espéranto, en partie par peur d'avoir l'air ridicules, eh bien...

Sarkozy ne estas pli bonŝanca en la germana ol en la angla en kiu li aspektas pli stulta ol li estas (?)

http://www.dailymotion.com/video/x1x63e_sarkozy-parle-anglais-enfin-essaye_politics

Okaze de la ceremonio okazintaj la 10an de novembro memore al la 20^a datreveno de la malkonstruo de la muro de Berlino, amasinformiloj primokis lin en Germanio same kiel en Francio pro tio ke, anstataŭ diri "Wir sind Brüder, wir sind Berliner" (Ni estas fratoj, ni estas berlinanoj) <http://www.buzzmoica.fr/video/lapsus-de-sarkozy-en-allemand-et-gros-flop-10292> li diris "Wir sind Brühe..." (fakte lia prononco pli similas al "Brüher").

Eble germanlingvanoj povos atente aŭskulti kaj havigi al ni ĝustan tradukon, sed laŭ tio, kion mi legis, tio signifas pli malpli "Ni estas buljono", aŭ "saŭco", aŭ "supo", iom analoge al la malnova franca "brouet" [brue], t. e. legomsupo, likva kaĉo.

Feliĉe, la konsekvencoj de malbona lingva komunikado estas ne ĉiam tragikaj. Ili estas ne malofte komikaj. La iama usona prezidento Jimmy Carter spertis tion dum vojaĝo en Pollando, kiel informis la brusela gazeto "Le Soir" (31^{an} de decembro 1977). La parolado, kiun li faris dum alveno en Varsovio, estis tradukita fare de interpretisto el la usona Ŝtatdepartemento, poldevena, sed kies familio jam delonge migris Usonon. Pro tio li uzis arkaikajn formojn, mallertajn terminojn, rusajn vortojn anstataŭ polajn, tiel ke iuj esprimoj estis jene tradukitaj: "Viaj deziroj por la estonteco" per "Viaj avidoj por la estonteco"; "Kiam mi forlasis Usonon" per "Kiam mi rezignis Usonon"; "Pollando estas la prapatra naskiĝloko de ses milionoj da usonanoj" per "Ŝtato kiu estas ankaŭ la patrio de 10 milionoj da usonanoj". Li eĉ diris: "La pola konstitucio, objekto de ridindeco". Plej ridinde, se oni prikonsideras la prudentecon de Carter, tio estas kiam la interpretisto tradukis kun forta usona akĉento: "Mi sekse deziras la polojn" dum Carter diris "Mi deziras koni la dezirojn de la poloj". Tiaspeca traduko estintus pli konforma al la personeco de prezidento Clinton pri kiu cirkulis divenludo, en kiu estis demandite kio estis lia pantalonfendo. Respondo: "US Open"... (Malfermita Usono).;-)

Sarkozy n'a pas plus de chance en allemand qu'en anglais dans lequel il apparaît plus stupide qu'il n'en a l'air (?)

http://www.dailymotion.com/video/x1x63e_sarkozy-parle-anglais-enfin-essaye_politics

Lors des cérémonies qui ont eu lieu le 10 novembre en souvenir du 20^{ème} anniversaire de la chute du mur de Berlin, des médias se sont moqués de lui en Allemagne et en France du fait qu'au lieu de dire "Wir sind Brüder, wir sind Berliner" (Nous sommes frères, nous sommes Berlinois) <http://www.buzzmoica.fr/video/lapsus-de-sarkozy-en-allemand-et-gros-flop-10292> il a dit "Wir sind Brühe..." (en fait, ça ressemblait plus à "Brüher")

Des natifs allemands pourront peut-être écouter attentivement et nous procurer une traduction juste, mais d'après ce que j'ai lu, ça signifierait plus ou moins "Nous sommes du bouillon", ou "de la sauce", ou "de la soupe", un peu à la façon du vieux français "brouet".

Par bonheur, les conséquences d'une mauvaise communication linguistique ne sont pas toujours tragiques. L'ancien président des États-Unis Jimmy Carter en a fait l'expérience lors d'un séjour en Pologne, comme l'avait relaté le quotidien bruxellois "Le Soir" (31 décembre 1977). Le discours qu'il avait prononcé à son arrivée à Varsovie avait été traduit par un interprète du département d'État étatsunien d'origine polonaise, mais dont la famille avait émigré depuis longtemps aux États-Unis. Il utilisait de ce fait des formes archaïques, des termes maladroits, des mots russes à la place de mots polonais, si bien que certaines expressions furent ainsi traduites: "Vos désirs pour l'avenir" par "Vos convoitises pour l'avenir"; "Lorsque j'ai quitté les États-Unis" par "Lorsque j'ai abandonné les États-Unis"; "La Pologne est le foyer ancestral de plus de six millions d'Américains" par "Un État qui constitue également la patrie de 10 millions d'Américains". Il est même allé jusqu'à dire: "La Constitution polonaise, objet de ridicule". Le plus cocasse, compte tenu de la prudence de Carter, c'est lorsque l'interprète avait traduit, avec un fort accent "yankee": "Je désire les Polonais charnellement" alors que Carter avait dit "Je souhaite connaître les désirs des Polonais". Ce genre de traduction aurait peut-être été plus conforme à la personnalité du président Clinton à propos duquel circulait une devinette demandant ce qu'était sa braguette. Réponse: "l'US Open...";-)



Kebekio kaj Porto Riko

Carlos Eliseo

Kiel multaj aliaj Esperantistoj, mi ŝatas lingvojn, inter ili la Francan. Antaŭlonge, malgraŭ la strikta Parizemeco de granda parto de lokaj ŝatantoj de la Franca lingvo, mi decidis, ke estas multe pli praktike kaj logike por Novjorkano viziti Montrealon ol Parizon. Rezulte, ekde la 1990-a jardeko, mi jare vizitas Montrealon. Nuntempe, estas ĝi inter miaj preferataj urboj. Krom lingva intereso, ankaŭ ekaltiris min al Kebekio la historia kaj kultura simileco inter ĝi kaj mia denaska lando, Porto-Riko.

Pri tiaj koincidoj mi ekkonsciis dum mia unua vizito al Kebeko. Promenante tra la urbo, mi observis gvidiston kiu montradis Kebekon al turistoj. Mi profitis de lia apudeco por iom pli lerni pri la urbo. Mi surpriziĝis kiam la gvidisto eksklamaciis: «Tian ĉi remparon vi ne trovos aliuŭbe en nia kontinento, krom en San-Juano.» Mi ne povas opinii pri la informo de la gvidisto, sed lin aŭdinte, mi konsciis pri similaj historiaj kaj kulturaj eventoj inter la du landoj. Komparo certe jam antaŭe frapis mian hazardan gvidiston. Mi ŝatus do diskonigi kelkajn faktojn pri Porto-Riko. Komprenoble, mi nur povas resume rakonti pri kelkaj eventoj el la historio de Porto-Riko. Krome rimarkendas, ke la historio de Porto-Riko restas argumentebla kaj reanalizebla de generacio al generacio, kaj inter politikistoj, verkistoj kaj opiniantoj.

Porto-Riko estis la Taina lando Borinken. Tainoj jam delonge ankaŭ loĝis en Hispaniolo kaj Kubo, kiam Kristoforo Kolombo alvenis. Tiame Bonrinken estis la landlimo inter du indianaj etnoj, la Tainoj kaj la Kariboj. Kiam Tainoj malliberitaj de Kariboj en malgranda Antila insulo vidis Kristoforon Kolumbon akompanatan de saminsulaj indianoj en karavelo, ili kriis «Tainoj!», vorto kiu en ilia lingvo signifis «la bonuloj». Sed se la Tainoj pensis ke samindianojn akompanis ankaŭ bonuloj, ili eraris. Hispanio rapide detruis la Borinken Tainan lingvon kaj kulturon, hispanigante la insulon lingve, kulture kaj religie.

Kristoforo Kolombo nomis la landon Sankta-Johano La Baptisto kaj la ĉefurbon Hispanio nomis Porto-Riko («Riĉa Haveno»). Tiel, oni diras, ĉar la haveno iĝis grava haltejo por la orŝarĝitaj galionoj el hispanaj kolonioj por pluvelado Hispanien. Malsimile al la plej parto de latinamerikaj landoj, Porto-Riko restis tre ligita al Hispanio. Hispanio asignis al insulo blazon-ŝildon montrante ŝafidon sub la inicialoj de la reĝoj hispanaj Fernando kaj Izabela (Isabel), latine tekstante «Johano estas nomo ĝia». Poste la nomoj iel ŝanĝiĝis inter la insulo kaj la ĉefurbo. (Sankta-Johano estas populara festo junia.)

La popolo, tamen, ne restis eterne tiom ŝafide paca antaŭ la hispana kolonia reĝimo. En la jaro 1868, eksplodis ribelon kontraŭ Hispanio, Krio de Lares («Grito de Lares»). Jarojn poste, en 1897, Hispanio donis al Porto-Riko ĝian nacian suverenecon en «Aŭtonoma Ĉarto» («Carta autonómica»). Sed tiu suvereneco ne daŭris longe. En 1898 Usono militas kontraŭ Hispanio. Venkita, Hispanio forcedas Porto-Rikon al Usono.

En la lernejoj Porto-Rikaj, ofte oni lernis kiel Porto-Rikanoj fakte bonvenigis la Usonan armeon. Tio verŝajne okazis, sed ne ĉie. Laŭ kronisto Ángel Rivero, ne ĉiuj estis bonvenemaj. Sed Usono facile

venkis kontraŭ Hispanio, kiu rezulte perdis ĝiajn lastajn koloniojn: Filipinojn, Kubon kaj Porto-Rikon. En Porto-Riko, Vaŝingtono uzis usonigajn rimedojn. En 1917 Porto-Rikanoj iĝas civitanoj de Usono. Grava rimedo por kulture dehispanigi la landon estis anstataŭigi uzadon de la hispana lingvo per la angla: Vaŝingtono ordonas, ke la lernejoj instruu nur angle. Victor S. Clark, ekonomikisto asignita estri la insulan edukistemon, deklaris pri porto-rikanoj jene:

«La plejparto de la homoj ne parolas puran hispanan lingvon. Ilia lingvo estas dialekto preskaŭ nekomprenbla por denaska barcelonano aŭ madridano. Havas ĝi nenian literaturon kaj apenaŭ valoras kiel intelekta komunikilo. Estas eta ebleco, ke estos tiom facile eldialektigi tiun ĉi popolon anglan ol eduki ĝin en la eleganta lingvo de Kastilio.» [mia elangligo].

Tiu «eta ebleco» («bare possibility»), rakontas H.L. Mencken en sia libro *The American Language*, gvidis la «Usonajn savantojn». En 1912, 98,4% de la lernejoj urbaj instruas nur angle, eĉ la hispanaj! Porto-Rika «proparolanto» rimarkas: «Nia popolo perdas sian lingvon sen lerni alian». Ĵurnalisto komentis, ke «Porto-Riko estas la sola popolo sen lingvo, ĉar ili aĉe parolas la hispanan kaj duoble aĉe la anglan» (Mencken). En 1946, la Porto-Rika parlamento petas, ke la anglan oni instruu nur kiel duan lingvon. La usona militista ŝtatestro, Tugwell, vetois la peton. Malgraŭ angligaj mezuroj, rakontas Mencken, malmultaj porto-rikanoj parolas la anglan, kaj anglaj ĵurnaloj ne sukcesas, nur la hispanlingvaj.

(“Masakro” en urbo Ponce. [<http://historia.mforos.com/725450/4877157-la-sangrienta-cara-del-colonialismo-americano-masacre-de-ponce-1937/>])

En la jaro 1937, okazas manifestacio kontraŭ la tiama reĝimo sub-usona. Policistoj pafas mortige la manifestaciantojn.

En la jaro 1948 la hispana lingvo estas reestabligita.

En 1950 okazas nova ribelo. La ŝtatestro domo estas atakata; okazas naciista ribelado en urboj Jayuya, Arecibo, Mayagüez kaj aliaj partoj de la insulo. Kubo kaj aliaj landoj protestas. Usono deklaras la aferon interna kaj draste haltas la ribelon, ĉi-foje ankaŭ per la Usona armeo kaj artilerio (kaj, laŭ kelkaj, ankaŭ bombado). Multaj naciistoj kaj sendependistoj estas malliberigitaj.

En 1952 Usono aprobas novan politikan rilaton. «Komunumo» (Commonwealth) nomas Usono tiun rilaton. Porto-Riko nomas ĝin «Ŝtato Libera Asociata» (Estado Libre Asociado), supozeble ia aŭtonoma regado, kvankam la vera povofonto rezidas en Vaŝingtono.

En 1954, grupo da Porto-Rikaj naciistoj, inter kiuj virino, Lolita Lebrón, protesto-cele kriante «Porto-Riko ne estas libera!» pafas antaŭ la kongresa sesiejo en Vaŝingtono, vundante kelkajn kongresanojn.

Laŭ lastaj statistikoj, nur 11% de la loĝantaro bone scipovas la anglan. (Eĉ Prezidento Obama agnoskis la lingvan situacion. Lia eduka komitato pri Porto-Riko deklaris, ke Usono «devas doni al Porto-Rikaj geknaboj la bezonataninstruadon por ke ili lernu la anglan kaj garantii scipovon de la hispana»). Tamen, Porto-Riko estas ja tre ligata al Usono. La plejparto de la popolo preferas

gardi ian rilaton kun Usono, ĉu kiel alia ŝtato Usona ĉu suverenece (laŭ ia difinota «kulmino» de la «libera asocio»), sed iel gardante komunan civitanecon. Referendumoj kaj plebiscitoj montras, ke preskaŭ duono de la loĝantaro preferas ne iĝi Usona ŝtato sed preskaŭ duono preferas Usonŝtatiĝi.

La diverĝo pli kaj pli baziĝas sur ekonimikaj kialoj. Sed ĉe multaj Porto-Rikanoj en la insulo, la timo perdi la bontenadon de la hispana lingvo restas grava kialo por ne iĝi Usona ŝtato. Je 1980 la suverenececa insulestlo Rafael Hernández Colón, de la Populara Partio Demokrata (PPD), forigis la anglan kiel instancan lingvon. Tamen, la usoniĝeca Partio Nova Progresista (PNP), aliancita al usona Respublikana Partio, emas plifortigi la anglan kaj je 1992 restarigis ĝian uzadon apud la hispana. Ĵus ĉi jaron PNP pretendis, ke la voĉdonaj balotoj estu dulingva. PPD kaj aliaj juĝis ĝin angliga mezuro kaj protestis: la balotoj restis unulingvaj.

Evidentiĝas, ke ambaŭ, Porto-Riko kaj Kebekio, travivis similajn eventojn. Ambaŭ nevole pasis de prapatrujo al anglalingva potenco; ambaŭ spertis anstataŭigon de ilia lingvo per la angla; ambaŭ rezistas tian lingvan ŝanĝon; kiel montras plebiscitoj kaj referendumoj, ambaŭ restas ankoraŭ duone dividitaj pri ilia destino.

Komprenoble, la situacio de Porto-Riko kaj Kebekio ne estas la sama. Porto-Riko estas teritorio (aŭ kolonio, laŭ alia politika vid-

punkto) de pli granda kaj vasta potenco kaj restas plene dependa de ĝi por sia ekonomika bonfarado; Kebekio havas sufiĉe fortan pezon politikan, nombran, kaj industrian. Jam delonge multaj Porto-Rikanoj loĝas ekster la insulo. Tiu kontinenta generacio havas pliparte la anglan kiel sia denaska, ĉiu-taga kaj ofte sola lingvo. Pri kiel politikaj kaj kulturaj premoj rolos sur Porto-Rikon kaj Kebekion, nur la tempo diros sian diron.

Rezultato de kelkaj plebiscitoj aŭ referendumoj en Porto-Riko

(<http://eleccionespuertorico.org/cgi-bin/eventos.cgi>)

Jaro	Por “Ŝtato Libera Asociata”	Por ŝtatiĝo	Por sendependeco	Notoj
1967	60.40%	39.00%	00.60%	
1993	48.60%	46.30%	04.40%	
1998	00.10%	46.50%	02.50%	“neniu el tiuj” 50.30%

Kelkaj Fontoj:

Crónica de la Guerra Hispanoamericana en Puerto Rico; Ángel Rivera; Instituto de Cultura Puertorriqueña; San-juano, 1972.

Historia de Puerto Rico; Paul G. Miller; Rand McNally; Novjorko, 1922

Historia de la nación Puertorriqueña; Juan Ángel Silén; Edil; Río Piedras, 1980

The American Language, Supplement Two; H. L. Mincken; Knopf, Novjorko, 1962

Wikipedio.

Avo Frosto estas esperantisto!

Le Père Noël parle l'espéranto!

En 2002, le Père Noël (Avo Frosto en espéranto) de Postes Canada a appris l'espéranto. Donc, depuis cette année-là, les enfants espérantophones qui lui écrivent reçoivent tout naturellement une réponse dans cette langue. En décembre 2008, Avo Frosto



a répondu à 51 enfants (dont quelques grands enfants) du Royaume-Uni (île de Man), de la République Tchèque, de la France, de la Hongrie, du Japon, des Pays-Bas, de la Nouvelle-Calédonie, de la Pologne, de la Slovaquie et bien sûr du Canada.

Kristnasko 2009 alvenas kaj, kiel ĉiujare, centmiloj da infanoj el Kanado kaj la tuta mondo skribos al Avo Frosto. Tradicie en Kanado infanoj kiuj skribas al li en la franca, angla aŭ en dudeko da aliaj lingvoj ricevas respondon el la norda poluso. Denove en 2009, la infanoj, kiuj skribos al Avo Frosto Esperante, ricevos respondon en Esperanto.

En 2001, la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) traktis kun la Kanada Poŝta Servo, proponante la uzon de Esperanto por komuniki kun la esperanlingvaj infanoj de la mondo. La Kanada Poŝta Servo jesis al la propono de ESK kaj, ekde Kristnasko 2002, Esperanto estas inter la korespondaj lingvoj uzataj de Avo Frosto kaj de liaj helpantoj, la volontuloj de la Kanada Poŝta Servo por subteni alfabetigon.

Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn, eĉ se skribitajn de etaj manoj kiuj lernas skribi. Ne forgesu klare skribi viajn nomon kaj adreson, indiku ESPERANTO por certigi respondon en la ĝusta lingvo.

Avo Frosto Norda Poluso Kanado, Canada Hoh Oho

Noto: Dum Decembro 2008, Avo Frosto respondis en Esperanto al 51 infanoj (fakte kelkaj estis plenkreskaj infanoj) el Britio (Mank-insulo), Ĉeĥio, Francio, Hungario, Japanio, Kanado, Nederlando, Novkaledonio, Pollando kaj Slovakio.



Albert Jacquard subtenas Esperanton

“Moi, Albert Jacquard, ministre de l'Éducation, je décrète”
(Mi, Albert Jacquard, ministro de Edukado, dekretas)

http://www.humanite.fr/1999-03-22_Politique_Moi-Albert-Jacquard-ministre-de-l-Education-je-decrete

En tiu artikolo, aperinta unue en la gazeto “L'Humanité”, vere tradukinda en Esperanton, kaj afiŝinda sur multaj retejoj kaj blo-
goj, i.a. sur tiuj de “Lernu.net” kaj “Edukado.net”, Albert Jacquard kondamnas la edusistemon de Francio kaj proponas ion alian.

Klarigoj : Albert Jacquard ne estas minist-
tro pri edukado, sed fama kaj populara
sciencisto, genetikisto, aŭtoro de hu-
manistaj verkoj. Bedaŭrinde, priskriboj
pri li ekzistas ĝis nun en Wikipedia nur
en la araba, angla, portugala, hispana
kaj franca: http://fr.wikipedia.org/wiki/Albert_Jacquard . Se neniu alia faros, mi
volonte aldonos Esperanto-version, sed
nur iam, ne tuj...

Estas notinde, ke Albert Jacquard estas
granda amiko kaj subtenanto de Espe-
ranto. Dum periodo, pluraj elsendoj de
France Culture, en kiuj li, en julio 2004,
pledis por Esperanto, estis aŭskulteb-
lablaj interrete ĉe [http://jerome.desquibet.org/
pages/254/](http://jerome.desquibet.org/pages/254/). Plue aperas la paĝo, sed la registraĵoj mp3 ne estas
alireblaj. Bedaŭrinde, mi neniam havis la ideon registri ilin. Tio
estas afero pri kiu oni devus alkutimiĝi por eviti, ke valoregaj
dokumentoj malaperu pro cenzuro aŭ malbonintencaj faroj. Ĉu
iu povus atentigi Jérôme Desquibet pri tiu problemo?

Tamen, per plia serĉado, mi povis malkovri blogon de Chantal
Serrière kaj jenan paragrafon (traduko):


“En paĝo 229, Albert Jacquard efektive opinias “ke estus saĝe
ne igi deviga la uzadon de la angla kaj havigi al Esperanto sian
ŝancon”, al kio respondis s-ino Planès : “Mi ne konsentas pri tiu
vidpunkto. Lingvo, kiu ne havas historion, simpla lingvo, ne
estus vere lingvo [tiel!]. La lingvo, tio estas la penso [ree tiel!].
Sed mi konsentas por kondamni la superregadon de la angla.”
[Kompreneble, ŝi proponas nenion alian...]. Komento ne nur su-
perflua, sed senfundamenta. Alveni al tia dedukto, tio estas fali
en neraciecon kaj simplismon.”

Albert Jacquard en faveur de l'espéranto

“Moi, Albert Jacquard, ministre de l'Éducation, je décrète”

http://www.humanite.fr/1999-03-22_Politique_Moi-Albert-Jacquard-ministre-de-l-Education-je-decrete

*Dans cet article, paru d'abord dans le quotidien “L'Humanité”, qui
mérite vraiment d'être traduit en espéranto et d'être affiché sur de
nombreux blogs et sites, entre autres ceux de “Lernu.net” et “Edu-
kado.net”, Albert Jacquard condamne le système éducatif français
et propose autre chose.*



Albert Jacquard

*Explications : Albert Jacquard n'est pas mi-
nistre de l'Éducation, mais un scientifique
fameux et populaire, généticien, auteur
d'ouvrages humanistes. Malheureusement,
des descriptions de lui n'existent jusqu'à
maintenant dans Wikipédia qu'en arabe,
anglais, portugais, espagnol et français :
http://fr.wikipedia.org/wiki/Albert_Jacquard.
Si personne ne le fera, j'ajouterai volontiers
la version en espéranto, mais seulement
un jour, pas tout de suite...*

*Il est à noter qu'Albert Jacquard est un grand
ami et partisan de l'espéranto. Durant une
période, plusieurs émissions de France Culture,
dans lesquelles il avait plaidé pour l'espéranto,
en juillet 2004, avaient pu être écoutées sur*

*<http://jerome.desquibet.org/pages/254/>. La page apparaît toujours,
mais les enregistrements mp3 sont inaccessibles. Malheureusement,
je n'ai jamais eu l'idée de les enregistrer moi-même. C'est une chose à
laquelle on devrait s'habituer pour éviter que des documents précieux
soient rendus inaccessibles par la censure ou la malveillance. Quelqu'un
pourrait-il signaler ce problème à Jérôme Desquibet?*

*Cependant, par d'autre recherches, j'ai pu découvrir le paragraphe
qui suit sur le blog de Chantal Serrière :*

*“En page 229, Albert Jacquard estime en effet qu’“il serait judicieux
de ne pas rendre obligatoire l'usage de l'anglais et de donner sa
chance à l'espéranto”, ce à quoi Mme Planès répond : “Je ne partage
pas ce point de vue. Une langue qui n'a pas d'histoire, une langue
simple, ne serait pas véritablement une langue [sic]. La langue, c'est
la pensée [sic]. Mais je suis d'accord pour dénoncer la suprématie
de l'anglais [mais elle ne propose rien d'autre!].” Commentaire non
seulement superflu, mais infondé. C'est tomber dans l'irrationnel et
le simplisme que d'en arriver à une telle déduction.”*

Nekutima Esperanta aranĝo - en trajno!

Une rencontre espérantiste organisée... en train!

**Al la sekvajara Azia Esperanto-Kongreso en Mon-
golio oni povas veturi per speciala karavano en
la Transsiberia Trajno. Tiu vojaĝo de Moskvo (aŭ**

En junio 2010 estos organizita pertrajna vojaĝo tra Rusio survoje
al la 6-a Azia E-Kongreso (Mongolio, 2010). Nuntempe pretas
kunvojaĝi proksimume 10 esperantistoj el Francio, Italio, Ger-
manio, kiuj aŭ jam trajnumis survoje al UK en Jokohama (Japa-
nio, 2007), aŭ informiĝis pri la efektivigita vojaĝo “E-karavane”.
Itinero de la E-karavano al Mongolio estas ankoraŭ provizora
kaj ĝia konkretiĝo dependas de preferoj de partoprenantoj. Oni

**Peterburgo) tra Siberio - apud la lago Bajkalo! -
daŭros 10-12 tagojn, do ĝi mem estas iu ekskluziva
Esperanto-renkontiĝo...**

elektu unu el variantoj. La varianto, kiu kolektos pli da jeso-
j, estos efektivigita. La prezoj de la vojaĝo vin surprizoj kaj allogos!
Pliajn detalojn kaj konkretan retpaĝon pri tiu speciala evento
en junio 2010, Mongolio, trovu per la “Internacia Kalendaro de
Esperanto-Aranĝoj” ĉe <http://www.eventoj.hu>

Fonto: Ret-Info
<http://www.eventoj.hu>

Sindromo de Kronika Laceco aŭ Mialgia Encefalomjelito

Le syndrome de fatigue chronique expliqué par une victime

Martin Benoît

Je suis atteint du syndrome de fatigue chronique. Je décris la
maladie, les symptômes, les problèmes reliés à la maladie et mon
expérience personnelle de la maladie dans la dernière année.

Sindromo de Kronika Laceco, alie nomata Mialgia Encefalomje-
lito, estas malsano malbone konata sed pli disvastigata ol oni
pensas. Oni priskribas ĝin kiel kripligan kaj persistan lacecon, kiu
ne malaperas post ripozo. Oni konas nek kaŭzon de la malsano,
nek rimedon al ĝi. Ĝin akompanas pluraj aliaj simptomoj krom
laceco, kiel: kapdoloro, muskoldoloro, gorĝdoloro, dormpro-
blemo, memorproblemo, koncentradmanko, konfuzo, fizika kaj
mensa eltenemomankoj, maltoleremo al varmeco/malvarmeco
kaj ŝvitadego. Ankaŭ deprimado kaj angoreto povas aldoniĝi al
tiu simptomaro. La kriplecnivelo varias inter kapabli pene labori
plentempe ĝis apenaŭ kapabli ellitiĝi kaj zorgi pri si mem.

Oni kredas, ke la sindromo trafus proksimume po 4 homojn
el mil, aŭ 20 milionojn da homoj tutmonde. Afekciitoj ofte ne
scias kial ili sentas sin lacegaj, estas malbone komprenataj de
amikoj/parencoj/kunlaborantoj, konsultas multajn kuracistojn,
ne kapablas labori kaj pergajni monon, havas problemojn kun
asekurkompanioj. La diagnozo estas sufiĉe malfacila: per pluraj
radiologiaj, sangaj kaj urinaj testoj, oni devas eljeti plurajn mal-
sanojn kiuj kaŭzas lacecon (mononukleozo, kancero, anemio,
diabeto, tiroidproblemo, aidoso, multloka sklerozo, lupuso, ktp).
La simptomoj kaj ĝiaj efektoj varias inter la afekciitoj, kaj ili ofte
ŝanĝiĝas eĉ de horo al horo. Nur 12% de la afekciitoj retrovas
sian antaŭmalsanan staton.

Oni trovis ke kelkaj terapioj povas helpi kontroli la simptomojn.
La unua estas « kogna-komportamenta terapio », kiu helpas la
malsanulon trovi bonan sintenon rilate al la malsano. La dua
estas « kontrolata ekzerca terapio », kiu analizas la simptomojn
kaj trovas la idealajn ekzercojn por mildigi la simptomojn. Ankaŭ
kontraŭdeprimiloj povas helpi superi la simptomojn.

Post 11 monatoj, oni finfine diagnozis al mi ĉi tiun malsanon. Ĉio
komenciĝis lastan Novembron. Mi ekhavis simptomojn, pri kiuj

mi pensis ke ili rilatis kun gripo aŭ sinusito. Mi ne kapablis labori,
mi do tiam ĉesis labori. Oni faris al mi kelkajn radiografiojn kaj
sangotestojn, kaj nenio elstaris. Mia kuracisto sendis min al interna
medicino en malsanulejo (medicinfako pri visceroj: koro, pulmoj,
hepato, renoj, ktp). Nenio elstaras krom malgranda ĉeesto de
proteinoj en urino. Oni sendas min al psikiatro, kiu ankaŭ nenion
elstaran trovas. Lastan Majon, la asekurkompanio ĉesis pagi la
kriplecajn rentojn, mi do devis plenigi formularon pri longdaŭra
kripleco. La asekuro petis dosierojn de kliniko kaj malsanulejoj,
kaj tio postulis pli ol unu monato por finfine ĉion sendi al ĝi.
Dume, mi komencis preni kontraŭdeprimilojn iompostio, kaj
tio mildigis miajn simptomojn ĝis mi kapablis labori po inter 6
kaj 10 horojn semajne, lastan Julion. En Septembro, la asekuro
finfine sendis oficialan respondon al mia peto, sed ili rifuzas, pro
manko da diagnozo. Tiam, mi strebis trovi helpon pri mia malsano
kaj mia asekurproblemo. Mi konsultis juran klinikon, registarajn
programojn kaj la asocion pri la malsano.

Mi tiam trovis studon kiu forte ligas la sindromon kun nova el-
trovita retroviruso nomata XMRV. Ĝi estas trovata en mamuloj
kaj kaŭzas interalie leŭkemion al musoj. Oni ankaŭ trovis, ke ĉi
tiu viruso estas ankaŭ ligita kun prostata kancero. En 65% de tiuj
afekciitaj de la sindromo, oni trovis la viruson, kontraŭ nur 4%
por sanuloj. La asocio ofertis al mi partopreni en klinika studo
pri la viruso. Se do oni pruvos ke la viruso kaŭzas la lacecan sin-
dromon, tiu multe faciligos la diagnozon, kaj trovi terapion. Ĉar
tiu estas retroviruso kiel aidoso, kontraŭaidosaj terapioj povus
helpi kontroli la viruson.

Tiel estis mia vivo ĉi-jare! Post multe da streĉo, mi volegas ba-
tali kontraŭ mia malsano kaj mia asekurkompanio. Ĉio ne estas
malbona: mi taksas ke la malsano donis al mi okazon plibonigi
mian karakteron, esti pli kuraĝa en la vivo kaj aprezi ĉiujn etajn
bonaĵojn de la vivo. Mia spiriteco multe helpis min travivi tiujn
elprovojn kaj necertecojn. Kio ajn okazos, mi ĉiam pretos fari la
plejon kiel eblas fari. Ĉio malbona certege finiĝos.



Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

La manĝoj en MEDO estas bona ebleco gustumi ion novan. Se vi planas veni, ni petas ke vi pretigu aŭ aĉetu ion laŭ la vespera temo. Necesas anonci vian alvenon kelkajn tagojn antaŭe, se vi volas partopreni: informo@esperanto.qc.ca.

Samtempe informu nin pri tio, kion vi planas kunporti. Vi povas ankaŭ alporti tipan trinkaĵon. Atentu ke temas pri bufedeca manĝo. Eblos varmigi manĝojn forne aŭ mikroondforne.

Pensu ankaŭ pretigi ion pri la temo por la vespera babilado. Kompreneble se vi ne deziras kunmanĝi, vi estas bonvena je 19 h 30.

Si vous désirez participer aux repas communautaires thématiques, vous devez apporter un mets. Vous devez également confirmer votre présence quelques jours avant, en mentionnant le nom du plat. Si vous ne désirez pas participer au repas, vous êtes le bienvenu à partir de 19 h 30.

Tago	Dato	Horo	Loko	Ĉe la menuo..
Sabato	12-a de decembro 2009	18 h	Commensal	150-a datreveno de L.L. Zamenhof
Vendredo	29-a de januaro 2009	19 h 30	Commensal	Babilado pri filmojn
Vendredo	26-a de februaro 2010	18 h	MEDO	Komuna itala vespermanĝo
Vendredo	26-a de marto 2010	18 h	MEDO	Komuna kebekia vespermanĝo
Vendredo	30-a de aprilo 2010	18 h	MEDO	Fiŝa komuna vespermanĝo
Vendredo	28-a de majo 2010	18 h	Commensal	Sentema diskutado
Vendredo	18-a de junio 2010	18 h	MEDO	Barata komuna vespermanĝo
Vendredo	24-a de septembro 2010	18 h	Commensal	Jarkunsido de ESK
Vendredo	29-a de oktobro 2010	19 h 30	MEDO	Babilado pri infanrakontojn
Vendredo	26-a de novembro 2010	18 h	MEDO	Ĉina komuna vespermanĝo
Sabato	11-a de decembro 2010	18 h	Commensal	151-a datreveno de L.L. Zamenhof

Pliaj Esperanto-renkontiĝoj

22-24 ^a de majo 2010	7 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Trivero, Kebekio
9-11 ^a de oktobro 2010	17 ^a ARE (Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto)	Silvero, NY, Usono
21-23 ^a majo 2011	8 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kingston, Ontario
19-21 ^a majo 2012	9 ^a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kebeko, Kebekio

kaj?

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto et un regroupement de club espérantistes. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à:

riverego@esperanto.qc.ca

Montreala Esperanto-Domo (MEDO)
6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, H2G 2R8

(Vidu retejon por vidi kiel atingi)

(Voir site web pour un plan d'accès)

Libroservo, biblioteko nepre kun antaŭa rendevuo
Librairie, bibliothèque sur rendez-vous seulement

Service de librairie postale à Montréal

La libroservo de KEA en Montrealo akceptas mendojn rete kaj letere. Konsultu la retejon por pliaj informoj.

Service de librairie postale à Montréal

Le service de librairie de KEA accepte les commandes par courriel et courrier. Consultez le catalogue en ligne.

www.esperanto.qc.ca/katalogo

MEMO

Montreala Esperanto-Movado: www.esperanto-montreal.org